Saksujo-Anhalto

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Ni leviĝas pli frue

Karaj civitaninoj kaj civitanoj,

Saksujo-Anhalto startigis novan etapon de sia sukcesa landa kampanjo „Ni leviĝas pli frue".
Pri tiu ĉi moto multaj homoj estis atentantaj ne nur pri la miriga fakto, ke ni ĉiulabortage leviĝas naŭ minutoj pli frue ol la federacia meznombro. Ili ankaŭ estis atentantaj pri la mentaleco, kiu estas la tiala kaŭzo.
Fruleviĝantoj intencas okazigi ion. Kaj fakte okazis multaj aĵoj en nia lando.
Ĉi tie kelkaj ekzemploj:

- Nia brutta enlanda produkto – do la tuta valoro de ĉiuj en Saksujo-Anhalto mastrumitaj varoj kaj servoj – kreskis en la pasinta jaro kun tri procentoj pli forte ol la federacia meznombro.
- La unuan fojon ekde la reunuiĝo plialtiĝis en la jaro 2006 la nombro de la socialasekurendaj okupatoj.
- Per pli ol 6.000 aldonaj laborlokoj ekzistis federativaste la dua plej alta okupkreskado de la saks-anhalta industrio.
- Nia lando havas la plej altan laborproduktivecon en Orient-Germanujo.
- La eksportkvoto altiĝis sur 28,2 procentoj kaj la profesiregistrigoj denove superis la profesimalregistrigoj.
- Ni estas la ekonomia plej dinamika nova federacia lando kaj federacivaste la numero du malantaŭ Baden-Virtembergo. Tio montriĝas el la landkamparo 2007 de la „iniciativo nova sociala merkatekonomio" kaj la ĵurnalo „WirtschaftsWoche" (Ekonomia Semajno).

Nome de la landregistaro mi dankas al vi, karaj gekuncivitanoj, pro viaj faroj, via laboremeco kaj pro via volo intenci ion.

Plejkore via

Prof. D-ro Wolfgang Böhmer
Ĉefministro de la lando Saksujo-Anhalto

[*Fonto: „Elbe Report" / Magdeburg; 2007-09-30; tradukita de Klaus-Peter Bibiko*]